

## & Brulpereo:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 589 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Mondo kaj koro, 1921). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado (Norda Kantaro, #4409 kaj #4411), redisigante la strofojn als duversaj.>

### (#Melodio:

<1,6:31> (/mi mi dolre mi so somi re so;so soso soso fami re fa;

(#Rekantaĵe: mire do; domi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; Somi mimi re do)

)×19 )+

### (&Strofoj:

'1 /Am', artfa2jraĵo milkolora! ; Am',  
artfajraĵo milkolora!

(×:; **En la ĉen' ; dancu nun trankvile  
; ĉiuj ni trankvilas ; jen en amika  
ĉen' ; dancu nun trankvile.**)

'2 El kor' ekflagras vi subite. ; Mi  
ekbruligis vin. Ravite .....

'3 Mi ĝojis pri fajrejoj viaj. ;  
Espersteletoj verdradiaj .....

'4 Brilante tra l' animo lumis ; Kaj  
karesante milde zumis .....

'5 Pri l' feliĉego alvenonta. ; Kaj el la  
koro fajrofonta .....

'6 Flagradis flamo bluehela: ; Revado  
pri plezur' ĉiela: .....

'7 Pri lip-sur-lip', kaj kor-ĉe-koro. ; Ho,  
pluv' arĝenta, pluv' el oro, .....

'8 Ho, dolĉaj flamoj rozkoloraj, ; Ho,  
dolĉaj sentoj fajrofloraj .....

'9 De laŭstudenta am' naiva... ; Sed  
ruĝo de l' sopir' soifa .....

'10 Raketis, falis sur la koron. ; Mi  
sentis akran bruldoloron, .....

'11 Mi tamen ludis plu kuraĝe. ; Kaj  
nun malhele kaj sovaĝe .....

'12 Leviĝis en violkoloro ; La pezaj  
flamoj de l' doloro... .....

'13 Ektremis mi ĉe l' ekrigardo. ; Kaj  
venis kun bruliga ardo! .....

'14 Purpur' terura de l' pasio ; Galopas  
fajro jam tra ĉio... .....

'15 Mi time miras ĝian svingon. ; Mi  
krius jam, ho ve, estingon! .....

'16 Brulvundoj veas sur animo. ; Kaj  
kreskas jen la brul' sen limo, .....

'17 Jam kri' por helpo vane sonas. ;  
Stertore mi en flamoj dronas, .....

'18 Sangnuboj antaŭ la okuloj... ; Ve,  
mi pereas en la bruloj .....

'19 (De l' artfajraĵo milkolora.)× .....